

 <p>Universala Esperanto- Asocio</p>	 <p>KURSA REGISTRADO</p> <p>Estrara Subteamo: MOVADO</p>
--	---

Efika kaj multloka instruado de nia lingvo esencas por la kreo de novaj generacioj de nia komunumo. Necesa bazo por tio estas la realtempa registado de ĉiaj, ĉiunivelaj kursoj en aŭ pri la lingvo, kiu samtempe permesas interagon de lernantoj kaj kursgvidantoj trans naciaj limoj por atingi verajn interkulturajn kontaktojn.

La oficiala registrejo de kursoj por UEA (Universala Esperanto-Asocio) kaj ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estas ĉe nia partnero <edukado.net>



Ni ne povas troigi la gravecon, ke ni registru kursojn de Esperanto. En multaj landoj komenciĝis la nova lerneja jaro septembre, sekve devas ekzisti nova aro da kursoj. Ĝuste nun estas la momento anongi ilin. La listigo estas teknologie moderna, sed devas ekzisti pli ol la 166 momente registritaj kursoj (ĉ. 60 movadaj, 30 lernejoj) kaj kursgvidantoj (70). Zorgu, ke ankaŭ via mondparto aperu sur la mapo. Zorgu, ke viaj lernantoj kaj instruistoj havu fenestron al la mondo!

Por vidi la liston kaj mapon kaj starigi interklasajn kontaktojn, iru al:

<http://www.edukado.net/kursejo>

Tuj ĉe la eniro vi trovos facilan manieron anongi novan kurson, pere de elektronika formularo.

Sekvas kelkaj bildoj pri la aspekto de la interaktiva monda mapo.



Ruĝaj simboloj montras lerneajn kursojn, verdaj movadajn, grizaj kursgvidantojn. La bluaj kaj flavaj cirkloj montras sumojn por urboj – per pligrandigo vi povos vidi la unuopajn kursojn.




La bluaj ciferoj montras la nombron de kursoj en difinitaj urboj, la flavaj en regionoj aŭ kontinentoj.


Sube vi vidas samon, sed pri nur parto de Eŭropo. Sub la mapo vi vidas parteton de la kursa listigo. Klakado sur elementoj portos vian al pli detalaj informoj – nomo de instruistoj, nombro da lernantoj, koresponddeziroj ks.



	Tipo	Nomo	Kursgvidanto	Lando	Urbo
1	Lerneja kurso	La Grande Ourse	Monika Molnar	CH - Svislando	La Chaux-de-Fonds
2	Kursgvidanto	-	Mónika Molnár	CH - Svislando	La Chaux-du-Milieu
3	Kursgvidanto	-	Stanislaw Mandrak	PL - Pollando	Gliwice
4	Kursgvidanto	-	d-ro hab. Aleksandro S. Melnikov	RU - Rusujo	rostov-na-donu
5	Kursgvidanto	-	Sveflana Smetanina	RU - Rusujo	Moskvo



Jen mapo de pli eta regiono – parto de Centra Eŭropo. Pliaj grandigoj aŭ klakoj portos vin ĝis pli da informoj. Jen monda informreto, kiun indas partopreni! Agu hodiaŭ!



Nun ni proksimigis nin al Budapeŝto. Ni vidas du kursgvidantojn. Du pliaj malkovreblos en la 13a distrikto per duobla klako sur la blua cifero du. La kvina kaj sesa kursgvidanto loĝas ekster la teritorio de ĉi tiu mapo.

Klako sur la kursgvidanta simbolo aperigos detalajn informojn pri tiu kursgvidanto – i.a. kvalifikoj kaj preteco gvidi kursojn en kongresoj ks.

Vidu kiom utilas ĉi tiu servo – ne nur por instruistoj kaj lernantoj, sed ankaŭ por organizantoj de kongresoj kaj agantoj en Landaj Asocioj.

Se via lando aperas kiel blanka truo sur la mapo – ekagu! Kontaktu viajn kursgvidantojn, kaj instigu ilin anonci sin!

UEA alvokas al vi, ILEI alvokas al vi ... anoncu tuj viajn kursojn kaj kursgvidantojn!